**Kulturdomo de Esperanto, Grésillon, Saint-Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou, France**
*Nekomerca kooperativa societo kun variebla kapitalo, registrita en Angers (49) n-ro 522 621 556.*

# KUNVOKO al la Jarkunsido la 20an de junio 2020

La jarkunsido estas kunvokita la sabaton, 20an de junio 2020 inter 14h00 kaj 17h00. Ĝi okazos per aŭd-vida konferenco per interreto kaj/aŭ telefono kaj per fizika ĉeesto en Greziljono se la leĝoj permesas. Bonvolu sendi viajn demandojn pri la morala kaj financa raportoj anticipe por ke ni povu pli facile respondi dum la jarkunsido. La teĥnikaj detaloj estos en la retejo: gresillon.org/kunveno

Societano, kiu ne povos ĉeesti fizike aŭ en la konferenco, bonvolu nepre sendi sian rajtigilon per poŝto aŭ retmesaĝo. Vidu la lastan paĝon.

## Tagordo

1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj,
3) evoluo de la nombro de la societanoj, kontrolo de la kvorumo,
4) agadraporto 2019, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
5) financa raporto 2019, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
6) aprobo de la kontoj pri la jaro 2019 kaj imputo de la profito 2019,
7) voĉdono por la transiro de statuta rezervo al disvolviĝa fonduso,
8) buĝeto 2020,
9) kvitigo al la Komitato,
10) rezulto de la voĉdonado pri la Komitato,
11) aliaj demandoj.

## Evoluo de la nombro de societanoj

La 31an de decembro 2019, kalkulinte novajn societanojn, forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societaneco se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 243 societanoj kun 882 societaj partoj A (po 16 €). 507 societaj partoj B (po 200 €) estis akiritaj. Dum la jaro 2019, aliĝis 21 novaj societanoj, 1 societano donacis siajn societajn partojn, 2 societanoj forpasis, 11 societanoj estis forigitaj (sed reakiros societanecon se ili petos). 12 societanoj aĉetis 79 societajn partojn B.

## Agadraporto

La jaron 2019 distingigis ĉeesto de du deĵorantinoj en la kastelo. Dum la ludonoj kaj la staĝoj prizorgis la kastelon tiuj du deĵorantinoj kaj kelkaj administrantoj.

En la jaro 2019, la kastelo estis okupita dum 200 tagoj, t.e. 56% de la tempo: 48 tagoj de staĝoj, 84 tagoj de ludonoj, 64 tagoj de konstrulaboroj kaj 4 tagoj por la jarkunveno, komitatkunveno kaj aliaj kunvenoj surloke aŭ telefone. Inter la komenco de marto kaj la fino de decembro, 38 el la 44 semajnfinoj estis okupitaj (vidu la aktivecon rete sub: gresillon.org/a2019).

La korusa renkontiĝo de Interkant kunvenigis 26 ĉeestantojn de la 12a ĝis la 16a de aprilo. Jannick Huet estis staĝestro, Zdravka Lenepveu korusestris, Nathalie Dubrulle gvidis aktivecon pri arto kaj naturo kaj Sunjo Cash prizorgis kuiradon.

La staĝo PRINTEMPaS, kun intensaj kursoj, kunigis 40 ĉeestantojn de la 26a de aprilo ĝis la 4a de majo, el kiuj 15 trapasis la KER-ekzamenon. La kursojn gvidis Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. La ekzamenantaro konsistis el Katalin Kovats kaj François Lo Jacomo. Jannick Huet staĝestris kaj Sunjo Cash plenumis kuiradon. Olivier Buisson gvidis ekskursojn esperantlingve.

La 29an de majo, publika spektaklo organizita de la urbestraro okazis en Greziljono: teatra grupo ludis sur la granda libana cedro, super la publiko.

La **someraj staĝoj** okazis dum 10 tagoj en julio kaj 10 tagoj en aŭgusto, entute 20 tagoj.

La 5a semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj, de la 8a ĝis la 18a de julio, kiun staĝestris Elisabeth Barbay kaj Isabelle Nicolas helpe de Catherine Kremer kaj Caroline Mauboussin, kunvenigis 30 membrojn de SEL, JEU kaj RERS. Samtempe, la 3a maratona Esperanto-kurso, kun Dennis Keefe kaj Marion Quenut kiel instruistoj, akceptis 13 lernantojn. Entute, ĉeestis 50 personoj.

La 9an festan semajnon por infanoj kaj familioj, de la 11a ĝis la 19a de aŭgusto, kun Bert Schumann kiel staĝestro, Dennis Keefe, Jean-Luc Kristos, Fransoazo Noireau, Nicky Janssen, Larisa Osadĉuk, Anastasia Ermakova, Alain Delmotte, Catherine Kremer kiel animantoj aŭ instruantoj, ĉeestis 52 homoj, el kiuj 24 infanoj kaj junuloj 2- ĝis 22-jaraj. Entute, ĉeestis 64 personoj.

Tiuj ĉi **someraj staĝoj** kunvenigis 114 personojn. Kuiradon prizorgis Thierry Charles.

La 8an staĝon AŬTUNE, de la 26a de oktobro ĝis la 3a de novembro, staĝestris Bert Schumann kaj Jannick Huet, kun Anna Löwenstein, Murat Özdizdar, Xavier Godivier kiel instruistoj, kaj kun Françoise Noireau, Catherine Kremer, Nathalie Kesler kaj Isabelle Nicolas kiel animantoj. Samtempe, de la 30a de oktobro ĝis la 3a de novembro, Zdravka Lenepveu gvidis la koruson Interkant kiel korusestron. La 2an de novembro, en la kultura centro René d'Anjou de Baugé, publika koncerto okazis kun Interkant kaj 2 aliaj korusoj de Baugé kaj ĉirkaŭaĵo. --- Inter la 71 ĉeestantoj estis 36 lernantoj, el kiuj 7 infanoj, pluraj helpantoj kaj 22 kantantoj de Interkant. Thierry Charles kuiradis. En la tagmanĝo de la 1a de novembro, Thierry devis prepari rekordan nombron da manĝoj, por 64 personoj.

De la 28a de decembro ĝis la 1a de januaro, jarfina renkontiĝo okazis, gvidata de Bert Schumann, Nathalie Kesler kaj Thierry Charles. 22 personoj ĉeestis la novjaran Gresilvestran festenon.

Sume, dum la 48 tagoj de tiuj staĝoj en la jaro 2019, venis 275 homoj (279 en 2018, 278 en 2017, 254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) por 4 516 manĝoj kaj 1 590 tranoktoj.

Ni memorigas, ke la prezoj de la staĝoj ne plialtiĝis de dek jaroj kaj ke duon-tarifo validas por infanoj, junuloj, senlaboruloj kaj personoj kun malaltaj vivrimedoj, celante instigi esperantistojn al vizitado. Bonvolu informi pri tio viajn konatojn.

**Ludonoj**

Jam la sepan jaron la Kulturdomo financas sin per ludonoj al privatuloj. La 25 ludonoj enspezigis rekordan sumon je 54 742 € malnete (inkl. AVI). Ni proponas tiujn ĉi ludonojn per pluraj retejoj pri luado al grupoj kaj per la turisma oficejo. Ni provas altigi la lu-enspezojn per regula adapto de la prezoj al la diversaj datoj. La ĉambrojn antaŭ la ludonoj kaj staĝoj purigis Sunjo Cash, Marie Da Costa, Catherine Kremer kaj Véronique Koalal.

Du tutsemajnaj ludonoj okazis kun korusaj asocioj, el kiuj unu angla. Unufoje, esperantisto luprenis por festo kun naturistaj amikoj.

**Konstrulaboroj**

Dum 64 tagoj (14 malsamaj okazoj de volontulaj laboroj) ni daŭrigis la komencitajn konstrulaborojn.

La plej grava el tiuj ĉi laboroj estas la konstruado de la ĉambro alirebla per rulseĝo en la antaŭa bindejo.

Ekstere, ni daŭrigas la forigon de invademaj bambuoj kaj laŭroj, la zorgadon pri la 235 poploj kaj la beligon per florbedoj.

Kiel daŭrigo de la plej farendaj riparoj, tegmentisto komplete renovigis la tegmenton de la dekstra (okcidenta) kromdomo kaj la tegmenton situantan inter la ĉefa ŝtuparo, la ĉambro 16 kaj la lumspaceto ĉe la necesejoj. Firmao instalis drenilon malantaŭ la maldekstran (orientan) kromdomon.

Ni danku al René Jelenc, Yves Couturier, Bert Schumann, Frédéric Lauriol, Patrice Cazenave, Jean-Luc Kristos, Bernard Fontaine, Valérie Casqueveaux, Alain Descarpentries, Brigitte Ardon, Caroline Mauboussin, Catherine Kremer, Emmanuel Morin, Francis Bedon, Jannick Huet, Guillaume Lanier, Isabelle Nicolas, Jim Bayard, Paul Cousin, Pauline Gaborit, Sunjo Cash, Véronique Koalal, Vincent Gerbe kiuj partoprenis tiujn ĉi diversajn semajnfinojn kaj volontulajn konstrulaborojn en 2019.

**Dungadoj**

Sekve de la esploro farita danke al la 'Loka Progresiga Aranĝo' (DLA), unu persono estis dungita por zorgi pri la ludonoj, la purigo de la kastelo kaj la kuirado dum la staĝoj. Tiu ĉi persono restis dum aprilo kaj majo. Alian personon ni dungis de marto ĝis fino de 2019 kiel aferprovizanton.

# Financa raporto

La jaron 2019 distingigis tre bona vizitado de la Kulturdomo, same por la esperantistaj staĝoj kiel por la ludonoj. La enspezoj kreskis je 33% kompare kun 2018, ĝis entute 123 187 €. La staĝaj enspezoj stabilas je 46 153 € kaj la luaj enspezoj preskaŭ duobliĝis, atingante 68 800 €, danke al la bona nombro de klientoj kaj de menditaj restoraciaj servoj.

Koncerne rekonstruon de la tegmentoj, la unua parto farita kostis: 61 900 € por la okcidenta kromdomo kaj 8 560 € por parteto de la tegmento de la kastelo (ĉambro 16).

Koncerne prizorgadon de la kastelo, la damaĝoj kaŭzitaj de akvoliko en la granda ŝtuparo kaj en la ĉambro 16 estis riparitaj kontraŭ 1 455 €, repagitaj de la asekuro. La kloakon inter la verando kaj la nord-okcidenta angulo de la biblioteko oni ŝanĝis kontraŭ 1 419 €. Drenilo estis lokita malantaŭ la orienta kromdomo kontraŭ 2 687 €.

La sumo de la kostoj, makleraĵoj pri luado kaj vojaĝkostoj estas stabila.

La societa kapitalo altiĝis ĝis 115 512 € (+ 48 € de societaj partoj A ĝis 14 112 €, kaj + 13 600 € de societaj partoj B ĝis 101 400 €).

La ĉapitro "aliaj vendoj" estas stabila, kun altiĝo je 30% de librovendado (1 691 €).

Koncerne la disponeblan monon, ni havis je 2019-12-31 entute 165 308 €, el kiuj 20 032 € en ĝirkontoj, 128 028 € en ŝparkontoj kaj 17 248 € en societaj partoj de la banko Banque Populaire. 20 370 € oni antaŭpagis al la tegmentista firmao por rekonstrui en 2020 la tegmenton de la orienta kromdomo.

La spezkonto montras profiton je 39 560 € post imposto (9 329 € en 2018). Tiu ĉi profito rezultas el malpliigo de la kostoj pro prizorgado, anstataŭitaj de amortizataj investoj.

*La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) ne estas senditaj kun la nuna dokumento, sed publikigitaj en nia retejo*

# Somera programo 2020

- 2020-jul-27/31: Verda Naturisma Semajno kun INOE kaj FFN
- 2020-aŭg-03/13: 6-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj
- 2020-aŭg-03/14: 4-a Maratona Esperanto-kurso dum 7 ĝis 11 tagoj
- 2020-aŭg-10/14: 32-a Internacia E-Konferenco post OSIEK
- 2020-aŭg-17/27: 10-a Festa Semajno por infanoj, adoleskuloj kaj familioj

Vi ĉiuokaze povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- ➔ dans notre site sous : gresillon.org/agenda et : gresillon.org/inscriptions
- ➔ en nia retejo ĉe: gresillon.org/agendo et : gresillon.org/aligho
- ➔ rete al: kastelo@gresillon.org
- ➔ telefone al: +33 2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo), +33 6 51 24 24 23 (Bert)
- ➔ perpoŝte al la sekretario: MCE / Schumann, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo bezonas vian helpon! Dankon pro aliĝo kaj aligo de viaj amikoj.

# SINPREZENTO DE LA KANDIDATOJ

### Espéranto-France

Espéranto-France aktivas en diversaj kampoj por disvastigi Esperanton en Francujo. Estas granda honoro kandidatiĝi por kunlabori kun Grésillon, kiu havas komunajn celojn al nia asocio. Espéranto-France jam estis membro de la komitato de Gresillon kaj investis en partoj B de la kooperativo. Ni esperas fruktdonan kunlaboron kadre de estontaj projektoj.

### René JELENC

Mi estas 70-jara pensiulo. Mi partoprenis multajn staĝojn en Grezijono ekde 1955. Komitatano de 4 jaroj, mi prilaboras la financojn. Ŝatante naturon kaj manlaboron, mi partoprenas la semajnfinajn laborojn por prizorgi la parkon, la konstruaĵojn kaj aranĝi la novan ĉambron por handikapuloj. Mi ankaŭ rilatas kun la entreprenoj, ĉefe koncerne la renovigon de la tegmento. Mi kandidatiĝas por daŭrigi tiun laboron dum la venontaj jaroj.

### Xavier GODIVIER

50-jaraĝa, mi loĝas en Bretonio. Mi delonge aktivas en Greziljono kaj jam estis komitatano de 2004 ĝis 2014 kaj de 2016 ĝis 2020. Mi regule venas kun mia filino baldaŭ okjaraĝa kaj jam plia kastelanino de Greziljono. Mi daŭre pretas helpi al la administrado kaj prosperigo de la kulturdomo. Apogante la partneran asocion "La Kampo de la Griloj", mi pristudas kiel difini la respektivajn rolojn de la Kulturdomo kaj de la asocio, por ke tiu partnereco estu plej fruktodona por tiu magia loko Greziljono.

### SAT-Amikaro

La asocio SAT-Amikaro (Unuiĝo de franclingvaj esperantistaj laboristoj) denove kandidatas por ĉeesti la komitaton. Kiel kultura progresema asocio, ĝi klopodos kongrue kun sia statuto apogi sin sur la riĉaĵo, kiun konsistigas la Kulturdomo por disvolvi ĝian kaj sian agadon, en intereso de la tuta esperantistaro, kaj precipe de la proleta. Ĝi do aparte zorgos, ke tarifoj de staĝoj ebligu partoprenon de kiel eble plej multaj interesatoj, eĉ tiuj pagrilate limigitaj.

Ĝi ankaŭ celas apogi projektojn, kiuj malfermas la bienon al homoj, esperantistoj kaj ne-, kiuj konsentas kun niaj valoroj pri klerigado kaj popola edukado.

Ansofi Markov reprezentos nian asocion.

### Pierre SOUBOUROU « Ŝtonĉjo »

Mi naskiĝis la 22an de Aprilo 1980, mi estas nuklea inĝeniero, mi malkovris Esperanton je aĝo 12, mi scipovas aliajn lingvojn k loĝis en pluraj landoj. Mi aktivas en diversaj fakoj: medi-protekto, best-rajtoj, veg*ismo, laikeco, politiko.

Nun membro de SAT mi jam havis postenon en la Administra Komitato kaj aktive partopenis la vivon de Grezijono kiel rimedpersono, en la proviza komisiono, dum laboraj semajnfinoj.

Mi deziras efektivigi la starigitan projekton pri mastrumado, por doni al la Kultur-domo financajn rimedojn cele al ĝia memstareco, renovigo de la Kastelo, plinombrigo de ĝiaj vizitantoj kaj pligrandigo de ĝia influo en Esperantio kaj dume inkludo en ĝia ĉirkaŭaĵo, disvolvante progresemajn projektojn.

# VOĈDONILO KAJ RAJTIGILO

La 20an de junio 2020, okazos nia Jarkunsido kun renovigo de duono de nia Komitato. Alvenis ĝustatempe kvin kandidatiĝoj por kvin postenoj. Post la limdato, unu el la Komitatanoj demisiis, kaj lia posteno estos vaka ĝis 2022: tiu ĉi okazo ne estas antaŭvidita en nia statuto. Restas Komitatanoj ĝis 2022: Brigitte ARDON, François LO JACOMO, Louis-Nicolas BABIN, Pierre DIEUMEGARD.

Vi estas petataj:

- voĉdoni por la 5 kandidatoj al la Komitato (5 kandidatoj por 5 postenoj),
- se vi ne povos partopreni, sendi rajtigilon por la jarkunsido.

*La voĉdono okazos plejparte per la retejo balotilo.org (ĉiu societano ricevos individuan inviton por voĉdoni), sed tiuj, kiuj ne povos aŭ ne deziros voĉdoni pere de balotilo.org povos sendi la ĉi-suban voĉdonilon perpoŝte.*

Societano, kiu ne povos ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon kompletigitan per la nomo de societano, kiu ĉeestos la jarkunsidon, kontaktinte tiun ĉi. Ĉiu societano rajtas ricevi maksimume 5 rajtigilojn. Pliaj rajtigiloj estos aŭtomate nevalidaj.

*NB: okaze de rajtigilo ne kompletigita, tiu ĉi ne uzeblos por voĉdonoj sed estos enkalkulata por la kvorumo, nome 1/6 de ĉiuj societanoj necesa, por ke la Jarkunsido povu valide labori. Sennomaj rajtigiloj estos konsiderataj kiel aprobantaj la agadraporton kaj la financan raporton, la kontojn kaj la kvitigon de la Komitato. Ili ne estos enkalkulitaj en la diskutoj pri la aliaj tagorderoj.*

Enmetu la voĉdonilon en anoniman koverteton kaj sendu tiun ĉi koverteton kune kun via ĉi-supra rajtigilo, en alia koverto kun via nomo kaj la vorto "VOĈDONO", al jena adreso:

Madame KESLER
Grésillon, St. Martin d'Arcé
49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
France

✂------------------------------------------------------------

## VOĈDONILO - BULLETIN DE VOTE

*Vous pouvez rayer des noms.*
*Vi rajtas forstreki nomojn.*

N'écrivez rien d'autre sur le bulletin.
Nenion alian skribu sur la voĉdonilo.

**Pierre SOUBOUROU**

**René JELENC**

**Espéranto France**

**Xavier GODIVIER**

**SAT-Amikaro**

✂------------------------------------------------------------

## RAJTIGILO

*Sendenda se vi ne povos ĉeesti la Jarkunvenon.*

Mi subskribinto: ……………………………………………………

rajtigas S-ron, S-inon: ……………………………………………………

anstataŭi min dum la **Jarkunveno** de la
Kulturdomo de Esperanto, sabaton la 20an de junio 2020 je la 14h00

dato kaj subskribo